**EKO 2022**
**Esperiga Komuniko**

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 57> ● Afrika Kongreso – flugoj, informoj ● Zaozhuang ● < okt. 14**

# AMO 92 refoje, pri instruado

Dum tiu ĉi semajnfino okazos en la Esperanto-domo de KEA en Havano, la unuaj sesioj de AMO-seminario 92 kunordige kun UEA. Instruado estas la ĉefa programero, inter aliaj: Prof. Julián Hernández pritraktis jenajn erojn:

- Instruado de Eo laŭ komunika metodo. Rilatoj inter ĉefaj komponentoj de la metodo.
- La lernociklo dum la instruado de Esperanto. Ekzercotipoj. (Inkluzivas interaktivan agadon)



Aliaj temoj rilatas al informado, varbado kaj organizaj demandoj. Partoprenis 15 geesperantistoj el Havano kaj la centra provinco Villa Clara. Nova sesio okazos en decembro en la orienta provinco Guantánamo, dum tutlanda renkontiĝo konata kiel Zamenhofa metiejo. Fote: Julian kun Osmo Buller

Maritza Gutiérrez

# Filmo pri renoma muzeo en Ĉinio

Ĉar ĵus en la kunveno oni menciis la Esperanto-Muzeon en Zaozhaung-Universitato en Ĉinio, mi sendas la retligon de la filmo pri la Muzeo ĉe mia Jutubo-kanalo https://youtu.be/r1YA1sqhJn0

Viaj abonoj kaj komentoj estas bonvenaj.

Trezoro

# La sezono por Italio

Artikolo de Renato Corsetti pri la ĉi-jara Itala Esperanto-Kongreso, aperinta en la septembra eldono de “La Ondo de Esperanto”, estas legebla ankaŭ en la samtitola novaĵretejo ĉe https://sezonoj.ru/2022/10/italujo-3

# La 8-a AFRIKA KONGRESO en Senegalo invitas vin

## Enkondukaj vortoj

La kongreslando. Senegalo estas sekura kaj stabila lando. Ĝi estas unu el la raraj landoj en Afriko, kiu neniam konis puĉon. Kion vi povas fari ĉi tie?

- Sperti la akceptemon kaj gastamon de senegalanoj.
- Provi surlokajn kuirartajn specialaĵojn. Senegala kuirarto abundas je multego da pladoj tiel sukplenaj kiel diversaj, el kiuj kelkaj estas konataj kiel nemateriaj kulturaj heredaĵoj de Unesko.
- Sunumi ĉe belaj sablaj marbordoj.
- Malkovri tradiciaĵojn de la lando. Tra la jaro okazas tradiciaj festoj, kiuj estas inicaj ritoj, festivaloj ligitaj al la historia pasinteco aŭ agrikulturaj festoj de proponoj de unuaj rikoltaĵoj al la patronaj diaĵoj.
- Renkontiĝi kun fervoraj esperantistoj el pluraj afrikaj landoj/

Jen! Nun al ni restas la espero, renkonti vin inter la kongresanoj en Tieso. De la entuziasmo de multaj pli forte vastiĝos la Esperanto-movado

Adjévi Adjé

Flughaveno: Blaise Diagna. Flughavena kodo: DKR. Ĉ. 20 km de la flughaveno ĝis la kongresurbo de Tieso. La servataj urboj el kiuj eblas flugi rekte (je 24 sept. 2022)




**Ni alkroĉas refoje la bultenon de la kongreso, kiu donas la bazajn informojn.**

Jen kompanioj, kiuj servas la flughavenon:

| | | | |
|---|---|---|---|
| Senegal Airlines | Ethiopian Airlines | TAP Portugal | Air Burkina |
| ASKY | Binter Canarias | IBERIA | Kenya Airways |
| Mauritania Airlines | Air France | Royal Air Maroc | Turkish Airlines |
| Emirates | Air Peace | Brussels Airlines | Air Cote D\'Ivoire |
| Tunisair | Neos | Vueling | Delta Air Lines |

## Instruistaj preparoj

Vjaĉeslav Slavik gvidos de oktobro ĝis decembro Esperanto-kurson al 20 homoj ĉiun tagon de lundo ĝis vendredo en la ĉefurbo de Senegalo, Dakaro. Temos pri 45-hora ĉeesta instruado al kvar kvinpersonaj lernogrupoj.

Tiu ĉi lia agado disvolviĝas kadre de la kampanjo Hans Bakker de la Afrika Komisiono de UEA kun la subteno de Grosjean Mireille, ILEI kaj UEA. La aranĝo estas ligita al la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE), okazonta de la 26-a ĝis la 30-a de decembro 2022 en la alia senegala urbo Tieso. 91 personoj el 25 landoj (rekorda nombro el la historio de AKE) jam enskribiĝis por la kongreso. La reta aliĝilo plene funkcias ĉe https://afrika.esperantujo.io/8-ake/aligilo kaj la organizantoj dankemas por ĉiu (subten-aliĝo) aŭ donaco al konto Afriko ĉe UEA. Adjévi Adjevi

**SUBTENU LA KONGRESON per SIMBOLA PARTOPRENO!**

## Praktikaj informoj

La kongreskotizoj estas 50 EUR por la okcidentaj landoj, 40 EUR por mez- eŭropaj, orientaj kaj aziaj landoj (krom Japanio) kaj 10 EUR por ĉiuj aliaj landoj, ĉefe afrikaj.La pago de la aliĝkotizo donas rajton NUR al la kongresa programo, ricevon de kongresaj dokumentoj kaj sako.

Loĝado, manĝoj, ekskursoj kaj aliaj servoj estas aparte pagendaj por kongresanoj.

Laboro estas farata por afiŝi ĉiujn bazajn informojn kongresajn en la reto. Nur ne komfortas de ekstere de la kongreslando kunaranĝi efike ĉiujn informojn akurate. Progreso tamen okazas pri la pretiglaboroj.

Adjevi Adje (perita de Mirejo Grosjean.

## Senviz-bezonaj landoj (nacilingve)

Ĉiuj landoj de EU, Algeria, Andorra, Argentina, Australia, Bahamas, Bahrain, Barbados, Benin, Botswana, Brazil, Brunei, Burkina Faso, Burundi, Cameroon, Canada, Cape Verde, Central African Republic, Chad, Comoros, Congo, Democratic Republic of the Congo, Costa Rica, Côte d'Ivoire, Egypt, El Salvador, Ethiopia, Fiji, Gabon, Gambia, Ghana, Grenada, Guatemala, Guinea, Guinea-Bissau, Haiti, Honduras, Iceland, India, Israel, Jamaica, Japan, Kenya, Kiribati, Kosovo, Kuwait, Lesotho, Liberia, Liechtenstein, Madagascar, Malawi, Malaysia, Mali, Marshall Islands, Mauritania, Mauritius, Micronesia, Monaco, Morocco, Namibia, Nepal, New Zealand, Niger, Nigeria, Norway, Oman, Russia, Rwanda, Saint Kitts and Nevis, Saint Lucia, Saint Vincent and the Grenadines, Samoa, San Marino, Seychelles, Sierra Leone, Singapore, Solomon Islands, South Africa, South Korea, Sri Lanka, Suriname, Swaziland, Switzerland, Thailand, Timor Leste, Togo, Tunisia, Turkey, Tuvalu, Uganda, Ukraine, United Arab Emirates, United States, Vanuatu, Vatican City, Zambia, Zimbabwe.




Vidu, kiom proksimas la flughaveno al Tieso. Eĉ ne necesas eniri la ĉefurbon per uzo de taksio.

La distanco ĉ. 20 km.

Jen pliaj fotoj el Senegalo:













